# tejo:aktuale

n°514 | Marto 2026

**Karaj abonantoj,**
Dum la lastaj semajnoj nia volontula teamo ne ĉiam estis en kompleta konsisto – Konrad ekzemple forestis el Roterdamo pro muzika projekto en Germanio. Samtempe kelkaj el ni jam troviĝas en Italio antaŭ IJF, profitante la okazon por renkonti familion kaj amikojn antaŭ la venontaj aranĝoj.

Malgraŭ tiu provizora disiĝo, ni restas en regula kontakto kaj daŭrigas la laboron. Nun ni ĉiuj antaŭĝoje atendas la momenton, kiam ni denove kunvenos en plena teamo dum IJF.

La marta novaĵletero atingas vin en konciza formo, dum ni survojas al IJF... Ni deziras al vi agrablan legadon!

## ALVOKOJ




### TEJO bonvenigas kandidatiĝojn por komitatanoj B

Komitatanoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo en la Komitato. Eĉ se vi ne havas multan sperton, via energio, viaj ideoj kaj via engaĝiĝo estas tre bonvenaj.

Kandidatiĝu ĝis la 1-a de majo kaj estu parto de la ŝanĝo!

Legu pliajn detalojn tie ĉi.




### Iĝu gastiganto en Pasporta Servo

Ĉu vi havas liberan lokon hejme kaj volus helpi vojaĝantajn esperantistojn? 🌍

Pasporta Servo estas unu el la plej konataj iniciatoj de TEJO – tutmonda reto de gastigantoj, kiuj senpage akceptas gastojn kaj tiel ebligas pli proksimajn, homajn spertojn dum vojaĝoj.

En ĉi tiu artikolo vi ekscios pri la aliĝo kiel gastiganto kaj la eblo iĝi parto de tiu unika internacia komunumo.

# ANONCOJ




## Ŝanĝoj en TEJO-estraro

Post lastatempaj ŝanĝoj en la Estraro de TEJO, la Komitato elektis du novajn estraranojn por la mandato 2025-2026.

Jean de Dieu Kikako ekoficis kiel Ĝenerala Sekretario kaj Ranja Lydie Zafinifotsy aliĝis kiel senofica estrarano. Ni deziras al ili sukcesan agadon kaj agrablan kunlaboron!

Ni ankaŭ elkore dankas Snehaĝa Venkatesh kaj Alexandre Basque pro ilia ĝisnuna laboro kaj kontribuo al TEJO.

La aktualan konsiston de la Estraro vi povas vidi ĉi tie.

---

# EVENTOJ

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**




Aprilo alportas freŝan energion kaj senton de renoviĝo. Post periodo de pripensado, venas momento por agi, eksperimenti kaj malfermi vin al novaj eblecoj. La steloj favoras iniciaton, sed ankaŭ memorigas vin konservi ekvilibron inter entuziasmo kaj pripensemo. Aŭskultu vin mem, sed ne hezitu provi ion novan – eĉ malgranda paŝo povas konduki al neatenditaj rezultoj.




♈ Via energio kreskas post la ekvinokso kaj instigas vin ekagi pri novaj projektoj. Elektu klarajn prioritatojn por ne disĵeti vin kaj memoru, ke pacienco en kunlaboro donos pli bonajn rezultojn.




♉ Aprilo invitas vin trovi stabilecon en ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Vi emas serĉi sekurecon, sed nun utilos iom da flekseblo. Praktikaj aferoj progresas bone, se vi restas konsekvenca. En personaj rilatoj, sincera kaj trankvila komunikado helpos eviti

miskomprenojn.




♊ Via komunikemo estas via plej granda forto ĉi-monate. Novaj ideoj kaj kontaktoj aperos rapide, sed ne ĉiuj meritas egalan atenton. Elektu zorge, kion sekvi, por ne perdi fokuson. Mallongaj renkontiĝoj aŭ interŝanĝoj povas havi neatendite profundan efikon. 🎭




♋ Emocioj intensiĝas, sed ili ankaŭ gvidas vin al pli profunda kompreno pri vi mem. Aprilo estas bona tempo por prizorgi vin kaj viajn bezonojn, eĉ se tio signifas paŝi iom malantaŭen. Familiaj aŭ proksimaj rilatoj povas postuli atenton, sed ili ankaŭ donos senton de subteno. ✨




♌ Vi emas elstari kaj montri viajn kapablojn, kaj aprilo donas al vi ŝancojn fari tion. Tamen la plej bonaj rezultoj venos tra kunlaboro, ne konkurenco. Se vi permesas ankaŭ al aliaj brili, la tuta teamo profitos – inkluzive vin mem. 🦁🌿




♍Ordo kaj strukturo helpos vin antaŭeniri ĉi-monate. Vi sentas bezonon organizi viajn planojn kaj plibonigi viajn kutimojn, kaj tio donos bonajn rezultojn. Atentu tamen ne tro kritiki vin mem – sufiĉas fari paŝojn en la ĝusta direkto, eĉ se ne perfekte. 🛠📋✨




♎ Rilatoj estas en la centro de via atento. Aprilo favoras dialogon, repaciĝon kaj pli profundan komprenon inter homoj. Se vi evitas malfacilajn konversaciojn, nun estas la momento alfronti ilin trankvile. Ekvilibro inter doni kaj ricevi estos ŝlosila. ⚖✨




♏ Transformo estas via ĉefa temo ĉi-monate. Vi eble sentos la bezonon forlasi ion, kio jam ne utilas al vi, por fari lokon al io nova. Tio povas esti defia, sed ankaŭ liberiga. Fidu la procezon kaj ne timu ŝanĝojn – ili kondukos vin antaŭen.




♐ Via deziro esplori kaj lerni estas forta. Aprilo invitas vin provi ion novan – ĉu ideon, ĉu agadon, ĉu perspektivon. Eĉ malgrandaj paŝoj povas malfermi novajn vojojn. Restu malferma, sed ne forgesu fini tion, kion vi komencis. 🌍✨




♑ Koncentriĝu je viaj longtempaj celoj. Kvankam progreso povas ŝajni malrapida, vi konstruas ion stabilan kaj daŭran. Aprilo favoras disciplinon kaj konsekvencon. Samtempe, ne forgesu trovi tempon por ripozo – tio helpos vin resti efika.

♒ Via kreemo kaj originaleco elstaras ĉi-




monate. Vi facile trovas novajn solvojn kaj ideojn, kiuj povas inspiri aliajn. Ne timu esprimi vin, eĉ se viaj ideoj ŝajnas nekutimaj. Kunlaboro kun aliaj povas alporti surprize bonajn rezultojn.




♓ Via intuicio estas aparte forta, kaj vi facile sentas la etoson ĉirkaŭ vi. Aprilo estas bona tempo por interna evoluo kaj por aŭskulti viajn sentojn. Tamen gravas resti ligita al realeco kaj konkretaj paŝoj. Ekvilibro inter revoj kaj ago donos la plej bonajn rezultojn.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2026 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands